



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 2 Februaro, 2012

Kara leganto, ni havas plezuron prezenti al vi la freŝan numeron de la bulteno "Saluton!", kiu enhavas interesan artikolon – skiza plano de nia agado. Kompilis ĝin novelektita prezidanto d-ro Leszek Kordylewski, komenco de kies prezidanteco koincidis kun la fino de la deĵorperiodo de la fidela amiko de la E-societo, vic-konsulino de Pola Respubliko Aleksandra Krystek (ambaŭ sur la foto). Granda spaco de la bulteno, same kiel januara kunsido, estas dediĉata al la Esperantisto de la 2012 jaro – T. Sekelj (li estis fotita en Ŝikago, 1972).

Kaj... forpasis, jes, kun "-j", antaŭ kelkaj tagoj foriris al la alia mondo fama E-poetino Eli Urbanova (pri ŝi – en la sekvanta n-ro).
–La Redakcio

Skiza Laborplano de Les



Prez. Les kaj Aleksandra Krystek, Polanda Vic-Konsulino en Ŝikago

La jaro 2012 estis anoncita kiel Festojaro de Esperanto, pro la 125-a naskiĝdatreveno de la Internacia lingvo. Pro tio oni atendas kreskon de intereso pri Esperanto. Nia Societo devas plivigigi la informadon pri nia lingvo kaj movado en lokaj medioj: gazetaro, radio, TV. Necesas prilabori taŭgajn materialojn. Estus bone fokusi fortojn sagace ankaŭ je kontaktoj kun medioj de la multlingvaj etnaj grupoj, kiuj ja en Ĉikago suferas pro la lingvaj baroj kaj estas pli emaj, ol anglalingvanoj, ekinteresigi pri eblaj solvoj de la lingva problemoj.

Ni nepre devas plivastigi nian membraron. Necesas daŭre kontakti la malnovajn membrojn kaj antaŭajn interesintojn, kontaktintaj nin en la plej proksima pasinteco. Necesas aktualigi nian partoprenon en Interreto (ekz. – Vizaĝlibro).

Krom niaj regulaj tematikaj kunvenoj en Sulzer Library ĉiun 4-an mardon de monato (planataj datoj por 2012: 2/28, 3/27, 4/24, 5/22, 6/26, 8/28, 9/25, 10/23, 11/27), ni organizu tradician piknikon en ĉirkaŭaĵo de la urbo okaze de la 125-jara E-Jubileo (29an de Julio) kaj Zamenhofan Bankedon en Decembro. Ni konsideru organizon de Zamenhof-tago'12 kune kun samideanoj de najbaraj ŝtatoj (IN, MI, WI) kaj de universitatoj Urban-Ŝampano kaj Peorio (ambaŭ – Ilinojso).

Plue aperigadi bultenon "Saluton!" (se eblas – monate). Instigi membrojn al la literatura kaj traduk-agado; aranĝi "Literaturan angulon" en nia ret-paĝaro. Okaze de akcepto de taŭgaj proponoj, daŭrigi libran eldonagadon en Ĉikago.

Daŭre kunlabori kun la Oficejo de Ĝemelaj Urboj (Ĉikago), Sulzer Library, UEA kaj Esperanto-USA. Instigi societanojn aliĝi al UEA, E-USA.

Ni planu organizi instruadon de Esperanto pere de popularigado de uzeblaj interretaj fontoj por lerni Esperanton kiel, ekz. <http://en.lernu.net>; prezentadojn de Esperanto en lokaj universitatoj.

Tibor Sekelj (1912-1988)

Eŭropa Esperanto-Unio proklaEŭropa Esperanto-Unio proklamita 2012n kial la Jaro de Tibor SEKELJ –hungardevena jugoslava mondcivitano, ĵurnalisto, esploristo, verkisto kaj juristo. Li naskiĝis la 14-an de februaro 1912 en Spišská Sobotka en Aŭstrio-Hungario (forpasis la 20-an de septembro 1988 en Subotica, Vojvodino, Jugoslavio). En 1929 li ekvizitis universitaton por studi juron en Zagrebo (Kroatio) kaj diplomiĝis en 1933, kiel unu el la 3 plej junaj studentoj. En tiuj samaj jaroj li ankaŭ lernis pentrarton, skulptadon, la lingvon Esperanto, filmreĝisoradon kaj ĵurnalismen. Per tiu lasta fako li komencis vivteni sin.



Alpinisto, mondvojaĝanto. Li entreprenis ekspediciojn tra Sudameriko, Azio kaj Afriko. Diference de aliaj mondvojaĝantoj kaj esploristoj lia esplorcelo esence ne estis la materiaj aspektoj de la mondo, sed li volis kompreni kaj malkovri la esencon de la homa animo. En 1944 li partoprenis ekspedicion al Akonkagvo la plej alta monto (6962m) de Ameriko kaj atingis la montsupron. La ekspedicio estis drama: kvar el ses junuloj kiuj partoprenis pereis en neĝŝtormo.

En 1956 li ekis vojaĝon al Azio per aŭtomobilo, celante partopreni Unesko-konferencon okazontan en Nov-Delĥio kiel observanto de UEA. Dum tiu vojaĝo li havis konversaciojn kun ĉefministro Nehru kaj ties filino, estonta ĉefministro Indira Gandhi. Sekvas sesmonata restado en Nepalo, alia lando kiu ĝis tiam ne akceptis vizitantojn. La reĝo de Nepalo Mahendra invitis lin por danki al li pri la fondo de la unua popoluniversitato, kaj instruado de Esperanto. Tio estas la temo de lia verko «Nepalo malfermas la pordon», 1959, kiun li originale verkis en Esperanto. En 1972 okaze de internacia kongreso de etnologoj en Ĉikago (vd foton) li vizitis orientajn partojn de Kanado kaj Usono.

Laboro por Esperanto. Sekelj dediĉis grandan parton de sia energio por defendo de Esperanto. Komitatano de UEA ekde 1946, dum pli ol 30 jaroj li penis partopreni

tre multajn Universalajn Kongresojn. Kiel reprezentanto de UEA aŭ de Internacia Komitato por Etnografiaj Muzeoj li partoprenis tre multajn internaciajn konferencojn, kie li ofte estis la sola kiu rekte komprenis ĉiujn parolantojn pro sia kono de pli ol dek lingvoj. En 1983 li kunfondis EVA (Esperantistan Verkistan Asocion) kies unua prezidanto li estis kaj en 1986 li estis elektita membro de la Akademio de Esperanto. En 1985 li estis komisiita de UEA por atingi ke Unesko faru duan rezolucion favoran al Esperanto, kio okazis dum la 27a konferenco okazinta en Sofio.

Poligloto, eduktisto. Tibor Sekelj estis konata kiel poligloto. Li lernis ĝis bona uzgrado kaj povis paroli en diversaj periodoj entute tridekon da lingvoj. Naŭ el ili li konservis vive kaj aktive ĝis la vivo-fino : hungara, serba, germana, esperanta, itala, angla, franca, hispana, portugala. Nur en tri, nome la hispana, Esperanto kaj la serbokroata, li verkis – eĉ ne en la gepatra hungara, ĉar li ne konis ĝin sufiĉe por verkaj bezonoj. Li ofte ankaŭ interpretis inter diversaj lingvoj dum siaj vojaĝoj kaj ankaŭ poste dum sia agado por PIF dum akceptoj, aranĝoj ktp.

Verkisto. Tibor estas inter la plej grandaj originalaj E-verkistoj el la vidpunkto de lia konateco en neesperantista mondo, eble la plej fama, sekve laŭ la nombro de liaj tradukitaj verkoj el Esperanto. La plej sukcesa lia literaturaĵo «Kumeuaŭa - la filo de ĝangalo» estas tradukita al trideko la lingvoj de preskaŭ ĉiuj kontinentoj kaj pluraj aliaj al du ĝis dek lingvoj. La Japana ministerio por edukado proklamis la libron en 1983 kiel unu el la 4 plej bonaj junularaj literaturaĵoj aperintaj tiujare en Japanio kaj estis rekomendita al la junularo. Pro tio ĝi aperis en la japana je 300.000 ekzempleroj, verŝajne en plej granda kvanto en kiu iam ajn aperis libro tradukita el Esperanto kiel lingvo de originalo. Ĉiuj versioj kaj ĉiuj eldonoj de Kumeuaŭa aperis je unu miliono da ekzempleroj.

–Viktor Pajuk

Forpasis Vida Jerman

La kroata aktorino kaj esperantistino Vida Jerman mortis en la aĝo de 72 jaroj. La internacia Esperantujo ne havis multajn similkapablajn aktorojn, kiuj havis tiom da energio por Esperanto: dum preskaŭ du jardekoj ŝi tenis la torĉon de nia teatra vivo. Ŝi jam estis siaspeca „institucio“ en la kroata teatra kaj filma arto kiam aktoro Mladen Ŝerment malkovris al ŝi Esperanton kaj enkondukis la faman aktorinon al la Studenta Esperanto-Klubo. Tie ŝi komencis aktori en Esperanto en 1973 kaj ne ĉesis ĝis la morto. Poligloto, ŝi aktoris plurlingve. Esperanto estis ŝia pasio, en sia profesia vivo ŝi aktoris ne nur kroate sed ankaŭ angle, hispane, slovane. En Esperantujo Vida aliris karieron de teatra solisto, prezentante monodramojn. Ŝi kontribuis per teatra programo al la Universalaj Kongresoj de Havano, Seulo, Tamperejo, Adelajdo, Montpeliero, Berlino, Tel-Avivo, Pekino, Varsovio, Fortalezo, Florenco. Partoprenintoj de la Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo 2001 memoras ŝin kiel la neforgeseblan reĝinon Maria Teresia. Por sia teatra laboro ŝi estis honorita en 1997 per la ordeno de la prezidanto de respubliko Kroatio.



Lastan fojon mi vidis Vidan dum la vilna UK en 2005 (vd foton): ni kune “ripozis” vespere kaj tiu ŝi restis en mia memoro – kun cigaredo kaj glaseto da konjako. Dankon al Vida, kies intensan vivon ni kunĝuis. Ŝi instruis al ni ŝati belon, ŝi havis altajn estetikajn kriteriojn kaj ŝatis vitelecon, kiun ŝi elradiis.

–V. Pajuk

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Roberto Stalzer
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

28an de Februaro – Centjariĝo de E-Biblio k Tago de kirila skribo (V. Pajuk)

27an de Marto – Anglujaj vizitoj de Brusio Stigers

24an de Aprilo – Sepideh Laal: “Persujo, patrolando mia!..”

22an de Majo – Gvatemalo per okuloj de Marko Shafroth